nia voĉo


madrida esperanto-liceo novembro 2025

## PREZENTOJ EN NOVEMBRO EN NIA SIDEJO

La lundon 17-an de novembro okazos libroprezentado en la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio, en la strato Rodríguez San Pedro, 13, de Madrido. Temas pri nova poemaro, dulingva en la hispana kaj Esperanto, de Jorge Camacho Cordón, titolita “Gadir”. Jorge ĝin prezentos ekde la 19,00 horo kaj la eventon prezentos Ana Manero.


Ni kopias el la retejo de la eldonejo:

> «Visitar Cádiz por primera vez, y luego volver a ella en distintos momentos, no deja indiferente. Entre la ciudad y el Atlántico, entre el presente de cada visita y los pasados de la historia familiar o, por poner un par de ejemplos más distantes, de la colonia fenicia o de los estratos geológicos, el observador siente la necesidad de dejar constancia de su paso y de las impresiones y sensaciones recibidas.
>
> Los poemas de 2012 los escribí primero en esperanto y luego en castellano. Los de 2022 surgieron más bien en castellano, o quizás alguno en paralelo en los dos idiomas. En cuanto a los poemas marinos o marítimos del tercer bloque, conviven las tres posibilidades.»




La sekvan lundon, la 24-an, vizitos la sidejon la konata usona aktivulo, loĝanta en la valencia regiono, Dennis Keefe. Li rakontos siajn nunajn aktivaĵojn kaj babilos kun la ĉeestantoj.

## PREZENTOJ EKSTER LA SIDEJO




Oni antaŭvidas aliajn prezentojn ligatajn al Esperanto, ekster nia sidejo.

La 6-an de novembro la librejo IN-VERSO gastigos prezenton de libro pri kiu ni informis en la pasinta bulteno: la trilingva (hispana/esperanta/portugala) “Poesía luz me urge / Poezio lumo al mi urĝas / Urge-me poesia-luz” de Armando Silles McLaney. Ĉeestos la aŭtoro, kun la tradukinto al Esperanto, Miguel Fernández, kaj la kantaŭtoro Chega Gómez, «en literatura vespero kie poezio kaj muziko dialogas en tri lingvoj». La evento komenciĝos je la 19,00 horo, kaj la adreso estas Augusto Figueroa 21, en Madrido.

Krome, oni atendas prezentadon de la libro pri Maruja Mallo aŭtorita de Ana Manero, en ekstera librejo, sed ni ankoraŭ ne povas precizigi la daton, do bv esti atentaj al la kutimaj forumoj.

## KOMENCIĜIS ĈEESTA KURSO KAJ ANONCIĜIS ALIA


Kiel anoncite en pasinta numero, en oktobro komenciĝis nova ĉeesta kurso de Esperanto por komencantoj en Madrido, konkrete en la sidejo de Madrida Esperanto-Liceo.

La instruisto, Javier Vílchez, prelegis la 9an de oktobro en la Centro Cultural Galileo por prezenti la lingvon kaj la kurson, kun kontentiga nombro da ĉeestantoj.

Fuenlabrada Esperanto-Ligo anoncis alian kurson, kiu okazos en gia sidejo ekde novembro. Kontaktu ĝin ĉe la retadreso esperantoesdetodos@gmail.com aŭ ĉe la fejsbuka paĝo de la grupo: https://www.facebook.com/Fuenlabrada.Esperanto.

## AMPLEKSIĜIS LA PERIODO POR LA KURSO DE UNED

La Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado (Universidad Nacional de Educación a Distancia, UNED) anoncis la plilongigon de la enskribiĝo en la kursoj de lingvoj, inklude de la Esperanto-kursoj. La nova dato finiĝas tre baldaŭ, la 4-an de novembro, do rapidu por aliĝi aŭ por informi eblajn interesatojn.




Ni memorigas ke la kursoj havos ĉijare tri nivelojn: A2 (por komencantoj), B1 kaj (novaĵo!) B2.

Memoru ankaŭ ke la anoj de Hispana Esperanto-Federacio ĝuas tre altiran rabaton en la kosto de la enskribiĝo.

Bonvolu diskonigi, por kreskigi la nombron de lernantoj, kio ebligos la daŭrigon en venontaj jaroj. Eblas diskonigi ankaŭ inter homoj ekster Hispanio, ĉar UNED havas sidejojn en aliaj landoj, kaj por la niveloj B1 kaj B2 eĉ ne necesas koni la hispanan, ĉar la instruado okazas rekte en Esperanto.

Vidu detalojn ĉe: https://www.uned.es/universidad/inicio/estudios/idiomas.html.

## PROGRAMITAJ RENKONTIĜOJ

La kutima sabata kunveno okazos ne la unuan sabaton, pro la festo, sed la 8-an de novembro, je la 18:30, kiel ĉiam ĉe la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, numero 2. Memoru ke ĝi estas malferma al iu ajn, sendepende de la lingva nivelo kaj ke la babilado estas libera, sen programo.

Aparte de la anoncitaj eventoj, la sidejo malfermiĝos ĉiujn lundojn, post la 18,30, kiel tradicie. Ĉiuj estas invititaj.

## PLIAJ LOKOJ POR INFORMIĜI

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Vi povas trovi nin ankaŭ en la socia reto *Bluesky*, en la adreso: https://madridaliceo.bsky.social.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com